

Edistudio dekjaras.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1985 oktobro 26.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-155/Radiokasedo-155-B-969-1985-Claude-GACOND-Edistudio-dekjaras.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Per bela katalogeto la eldonejo [EDISTUDIO](#) atentigas nin, ke ĝi fariĝis dekjara.

A.- Fakte tiuj ĉi dekjaraj de kuraĝa eldona aktiveco riĉigis la esperanto-literaturon originalan kaj tradukan je aro da bone elektitaj verkoj posedindaj.

Cl.- Jen per kiaj vortoj Bruĉjo Kasini parolas pri sia eldonaktiveco enkonduke al la ĵus menciita fest-katalogo:

A.- En julio 1975 mi aperigis mian unuan libron, kiel eldona prizorganto; temis pri poeziciklo de Giuseppe Ungaretti, unu la plej karakterizaj italaj poetoj de la nuna jarcento, en esperanta traduko de Nicolino Rossi. Nun, en 1985, dek jarojn poste, mi gvidas propran eldonejon, kiu vantas katalogon da 30 titoloj en aŭ pri Esperanto, plus kelkajn en la itala pri aliaj temoj.

Cl.- Inter la titoloj, kiujn ni citos, troviĝas kelkaj kiuj signife influas sur la kulturo de la Internacia Lingvo: de la traduko de ĉiuj sonetoj de Shakesperare (dulingva eldono lukse bindita) per la genia plumo de William Auld, ĝis la laste aperinta originala romano de Spomenka Štimec, kies senpredenca stilo mirigis ĉiujn recenzantojn.

A.- En preparo estas pluraj novaj frandaĵoj, ankaŭ en la kampo de muziko, kiu apud la tradicia beletro estas la alia flago de "Edistudio".

Cl.- Listigo de la nun akireblaj eldonaĵoj de Edistudio donos al vi ne nur ideon pri la pozitiva dinamismo de Bruĉjo Kasini, sed ankaŭ tutcerte instigos vin akiri unu aŭ eĉ plurajn el tiuj ĝenerale agrable presitaj kaj belaspektaj libroj.

A.- Al la poezio Bruĉjo Kasini donis 5 verkojn:

Cl.- Pretertempe de Aldo de' Giorgi, Malmalice de Johan Valano, du originalaĵojn

A.- kaj la esperantigojn de Mauro Nervi: Blinda ermito de Maurizio Caprile, de William Auld: La sonetoj de William Shakespeare, de Nicolino Rossi: La doloro de Giuseppe Ungaretti. En preparo estas la plena poezia verkaro de William Auld, kiu aperos sub la titolo 'En boato senpilota'. Redaktas tiun ĉi pli ol 800-paĝan kolekton Aldo de' Giorgi.

Cl.- Nia prozo riĉiĝis je tri titoloj, baldaŭ kvar, dank' al la eldonaktiveco de Bruĉjo Kasini.

A.- Mondo de travivaĵoj de Tibor Sekelj, Ombro sur interna pejzaĝo de Spomenka Štimec, Materada de Fulvio Tomizza per esperantigo de Pier Giorgio Soranzo. Baldaŭ aperos Bestoj kaj homoj de Bernard Golden.

Cl.- Teatre aperis ĉe Edistudio La fatomaŝino de Jean Cocteau laŭ traduko de Georgo Lagrange, La gastejestrino de Carlo Goldoni laŭ traduko de Carlo Minnaja kaj Salale! de

Farok Topan kaj Ebrahim Husein, du teatraĵoj esperantigitaj el la sŭahila fare de Renato Korseti.

A.- Inter la eseoj estas menciendaj la verkoj de Bruno Migliorini: Lingvaj aspektoj de Esperanto ; de Kolomano Kalocsay, Gaston Waringhien kaj Roger Bernard: Parnasa gvidlibro ; de Helmut Sonnabend: Esperanto, lerneja eksperimento kaj de Giorgio Silfer: La Sesdekoka - ĉu decida jaro?

Cl.- Edistudio eldonas ankaŭ lernolibrojn kaj vortarojn. Ni menciu:

A.- Esperantonimoj de Marinko Ĝivoje, Corso di Esperanto de Menabene kaj Barbalace

Cl.- kaj la ĵus aperintan:

A.- Lingua Esperanto, Corso di base, de Renato Corsetti, Mauro La Torre kaj Nino Vesselia.

Cl.- Iom post iom la italoj ankaŭ havas bonajn lernolibrojn dank' al la poresperanta agado de Bruĉjo Kasini.

A.- Edistudio estas la Esperanto-eldonejo, kiu produktis plej multe da muzikaj eldonoj: ĝia katalogo ampleksas 8 kasedojn, ĉiuj kun akompano de tekstoj.

Cl.- De Ĝanfranko eldoniĉis la kasedoj La vojo kaj Kontakto. De Ĵak Le Puil: Danĝera ul' kaj Revenas mi. De Suzana: Per nia nura vol'. De Marĉela: Venos liber'. La kasedo titolita Baf! aŭdigas la voĉojn de Ĝanfranko, Gido kaj Marcela kaj Horo da opozicio tiujn de Ĝanfranko kaj Gulio. En preparo estas De Pont-aven al Varsovi' de Ĵak Le Puil.

A. - Rimarkinde, ĉu ne?

Cl.- La librokatalogeto, kiun ni menciis, komence de nia prelego, publikigas por ĉiu titolo recenzojn aperintajn en la revuoj Esperanto de UEA, Heroldo de Esperanto, Literatura Foiro, La Brita Esperantisto, La Kancerkliniko kaj L'Esperanto. Tiuj recenzoj kaj la plaĉa aspekto de la prospekto tutcerte komprenigos al multaj, kiom ni ŝuldas al eldonisto kiel Bruĉjo Kasini, kiu dediĉis kun granda kuraĝo kaj multe da kompetento sian eldonistan karieron al la zamenhofa lingvo.

A.- Niaj bondeziroj estas, ke sukceson kreskantan renkontu la eldonaktiveco de Edistudio kaj ties energiplena gvidanto, por ke esperanto daŭre riĉiĝu je posedindaj originalaj kaj tradukitaj libroj kaj kasedoj. La nura prezento de la eldonaĵoj de Edistudio en dek jaroj kreas ekspoziciecon, kiu tre pozitive parolas favore al la esperanto-afero.

Cl.- De Suzana, el la kasedo 'Per nia nura vol', jen la ribela kanzono, 'Ni jam enuis' :
(muziko)

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond raportis pri la eldona dinamismo de la dekjara Edistudio. Ĝis reaŭdo!